2-a Jaro, N-o 3 (55) APERAS S.A.T. SEMAJNE 15. Oktobro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktejo: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Ĉu Francio perdos sian Francecon?

Francio estas la plej malnova nacio el Okcidento. Tio signifas ke ĉi-tie kunmiksiĝis, kunfandiĝis en unu tuton diversaj fluoj, diversaj fortoj, kiuj estis antaŭe province disigitaj.

La franca lingvo nun estas parolata kaj komprenata pli malpli bone de ĉiuj francoj. Eble nur en Bretonio oni ankoraŭ povus renkonti gemaljunulojn, kiuj ne scipovas kompreni kaj paroli franclingve.[1])

Do la proceso france-nacia evoluis ĝis plena maturiĝo. La francaj patriotoj gloras pri tio kaj enfazas, ke tiu nacia maturiĝo signas la plej altan gradon de civilizeco kaj kulturo. Sur tiu fakto ili fortike konstruis naciisman ideologion, kiun encerbigi devas nepre ĉiuj lernantoj ĝis plena stultiĝo. En la lando kie vivis Rabelais (Rabele), Voltaire (Volter), Lamark, Renan, Anatol Frans kaj multaj aliaj liberpensantaj homoj, kiuj vigle kontraŭbatalis la religiajn dogmojn, nun regas tamen tre forta religia kredo: la patriotismo, kun sia mistiko, siaj kulto kaj ceremoniaro. Senpatriulo, sennaciulo estas ĉi-tie same malaprobegata, malbenata kiel la herezuloj dum la mezepoko. Tial ke la Proletaro ne havas materian intereson defendi la francan unuecon, la burĝaro devis do anstataŭi tiun mankon per trompa ideologio.

Je la nomo de tiu mistifikaĵo, preskaŭ 2 milionoj da junaj francoj estis mortoferataj dum la lasta popolbuĉado, kaj pli ol 3 milionoj difektataj. La patrio ja similas la mitan personon Ugolino, kiu manĝis siajn infanojn por konservi al ili patron.

Tiu sangelverŝo kompreneble malfortigis la france-nacian organismon. Plie, la nombro de naskiĝoj malpliiĝas. Ekzemple, dum la unua kvaronjaro nuna, la nombro de naskoj estis 199.835 dum tiu de mortoj estis 204.431. Do, malplusa diferenco je 4.596. Por la tuta jaro la malpluso estos proksimume 18.384. Tiu malpliiĝo de naskiĝoj okazas precipe en la regionoj kie la popolamaso estas pli klera kaj senreligiema. Tial ke tiuj kaŭzoj verŝajne plifortiĝos estonte en la tuta lando, oni do povas antaŭdiri, ke la franca naskemo pli kaj pli malfortiĝos.

Grandkvanta buĉado de junaj francoj kaj malnaskemo de la loĝantaro senigas la ekspluatistaron je laborforto. Por kompensi tiun mankon la mastraro venigis amase fremdajn laboristojn. Estas neeble ekscii tute precize pri la ĝusta nombro de alvenintoj. Almenaŭ kelkaj gazetoj asertas, ke nun en Francio estas pli ol 3 milionoj da fremduloj.

En kelkaj regionoj, la fremdaj laboristoj formas kompaktan aglomeraĵon, veran nacieton en la franca nacio. Ekzemple, ĉe la mineja regiono norda estas urboj kie poloj reprezentas 20% (Lens), 40% (Courrière, Kurier), 68% (Ostricourt, Ostrikur) el la loĝantaro.

En Paris mem, en kelkaj kvartaloj, oni aŭdas paroli ĉiujn lingvojn krom la franca. La situacio atingis tian staton, ke nun el diversaj flankoj aŭdiĝas indignitaj voĉoj de patriotoj. Tio estas tre amuza.

Antaŭmilite, tiuj patriotoj jam havis kiel agitvorton: *Francio al la francoj!* Ili flame predikis, ke necesas forpeli la fremdulojn por malhelpi, ke la nacio fariĝu la mestiza kunmiksaĵo. Milito nepre okazos, ili profetis, sed post la venko, la francoj estos mastroj ĉe si kaj ne toleros entrudulojn . . . Kaj nun tiuj stultaj arĥaikemuloj konstatas, ke malgraŭ la "venko", Francio estas pli kaj pli "invadata". Tio ja estas abomenega, ĉu ne? Nu, karaj legantoj, aŭskultu la malbenojn de la francaj patriotoj kaj tenu vin firmstare por ne ŝanceliĝi pro rido:

"Ne plu estas loko en Francio por la francoj! La tuta parazitaro, la tuta kanajlaro, la tuta diboĉularo, la tuta sentaŭgularo kaj malnoblegularo sin ĵetis sur Parizon, kiu fariĝis Universala bordelo.

Jen la vero, kiun necesas diradi. Blinda estas kiu ĝin neas aŭ malatentas ridaĉante kaj petolante. La Historio neniam, nenie montris jenan spektaklon: iu popolo facilanime konsentanta je sia dekadenco, je sia malposediĝo, je sia buĉiĝo . . . Ne plu ekzistas franca bongusto, ne plu ekzistas franca lingvo kaj baldaŭ ne plu ekzistos franca nacio . . . Pli ĝuste, jam ne plu ekzistas Francio, la vera Francio: Francio. La lando kie nun ni loĝas estas kuvego en kiu bolas stranga miksegaĵo. Post la kuirado, kio eliros? Iu regiono, iu loĝantaro, kiujn oni nomos ankoraŭ francaj, sed ĝi estos nur german-brit-ĉeĥ-hispan-slavĉin-juda konfuzegaĵo. Ĝi estos lo nepriskribebla, ĝi estos ĉio ajn krom Francio . . ."[1])

Jen la tono laŭ kiu kelkaj gazetoj agitadas kontraŭ la "invadado" Francion de eksterlandanoj. Estas ja certe pli ridinde ol riproĉinde . . .

La emigracia problemo okupas pli malpli ĉiujn rondojn. El diversaj flankoj oni

[1]) Post la reakiro de Alzacio kaj Lotaringio, tio ne plu estas vera. En tiuj du provincoj multaj loĝantoj scipovas nur la germanan lingvon aŭ la tiean dialekton.

[1]) Camille Vergniol (Kamij Vernjol) en la jurnalo "Paris-Midi" (Parizo-Tagmezo) 23. julio 1925.

nur postulas, ke la enmigrado estu regulota. La francaj sindikatoj petas, ke la fremdaj laboristoj ricevu la saman salajron kaj ĉiujn avantaĝojn, kiujn laŭleĝe rajtas la francoj. Ĉe la Parlamento la temo estis priparolata. S-ro Nogar, la buĝetraportinto pri la fremda manlaborforto, konkludis je neceseco starigi *Nacian Oficejon Emigracian.* Sed, ĝis nun, fakte ne estas io pozitiva tiurilate farita.

Notinde estas, ke la franca registaro severe rilatas al la fremdaj laboristoj, kiuj estas suspektataj esti revoluciemaj. Dum la burĝspiritaj fremdlingvaj gazetoj povas tute sen malhelpo esti eldonataj en Francio, male la revoluciaj gazetoj estas persekutataj kaj malhelpataj plej diversmaniere. Ekzemple, la laborista pollingva gazeto devis ŝanĝi kelkfoje la titolon pro malpermeso daŭrigi la eldonadon. La saman sorton havis la itallingva gazeto laborista. Tiuj faktoj pruvas sufiĉe klare, ke la fremda laboristaro ĉi-tiea povas malfacile sin defendi kontraŭ la ekspluatemo de la mastraro.

Dum la ŝovinistoj indignite agitadas kontraŭ la fremdularo, la "progresemaj" francoj nur petas, ke oni plifaciligu la regnaniĝadon, t. e. la surpapera naskigo de "francoj"! S-ro Loucheur (Luŝeur), la eksministro kaj grandindustriisto, kiu sekve bezonas grandkvante laborforton, tre bedaŭras, ke nur apenaŭ 10000 regnaniĝoj okazas ĉiujare, dum "Francio kapablas asimili ok, eĉ dekoble pli da individuoj." Li petas, ke oni plimalkarigu la koston por akiri la rajton franciĝi. Tiu formalaĵo kostas nun 1500 frankojn.

Certe la vidpunkto de la industriistoj venkos. Senefika restos la malbenoj de la ŝovinistoj kaj la predikoj de la pastroj, kiuj varme alvokas la kredanojn, ke ili naskigu multe da infanoj por savi Francion.

— La pastroj — kiuj estas senedzinaj — montru la bonan ekzemplon, ŝerce diras la popolanoj!

La emigracia problemo antaŭ kiu nun staras Francio estas tre interesa por kiu ne limigas sian horizonton je la geografia konturo de iu ajn nacio. Ĝi montras ne nur la krimecon de la patriota ideologio sed ties stultecon. La blindaj patriotoj ne kapablas vidi, ke nacia proceso maturiĝinta signas la komencon de nova alia proceso. La evoluo ne povas halti je la nacia stadio. La franceco de Francio malaperos, samkiel malaperis la provincaj apartecoj el kiuj formiĝis la nuna franca nacio. Kaj tio ne devas ĉagreni la francajn laboristojn. Ilia sorto estas pli kaj pli ligata je la sorto de la laborista klaso tutmonda. Sekve, mortu la franceco de Francio kaj vivu sennacieco tutmonda.

E. Lanty.

LASTAJ NOVAĴOJ

La ĉi-jara Kongreso de Brita Labora Partio okazis 29. sept. ĝis 2. okt. Jen la statistiko pri ĝia kresko:

	Parlamentanoj	Voĉdonoj
1900	2	62698
1924	151	5487620

Ĝi enhavas nun 150 junulfakojn kaj 1535 virinfakojn (kun pli ol 200000 anojvirinoj). La Ekzekutiva Komitato kontraŭstaris anecon de iu KP-ano aŭ kiel individuo aŭ kiel reprezentanto de sindikato. La Enketkomitato decidis, ke la mondfama letero de Zinovjef estis falsaĵo.

Grava fervoja akcidento okazis la 6. okt. dum la enveturo de la vagonaro, venanta je 7 1/2 horo de Aŭe en le ĉefstacidomon de Chemnitz (Saksio). El ĝis nun nekonata motivo renversiĝis vagono kaj mortiĝis 3 personoj, 12 vundiĝis grave kaj negrave.

Post senrezultaj traktadoj perfektiĝis la lokaŭto por la tuta metalindustrio de Hohenlimburg (?), kio trafas 3500 laboristojn.

La striko de la transportlaboristoj en Berlin finiĝis post unu semajna daŭro.

En Damaskus okazis novaj ribeloj kontraŭ francaj trupoj. La franca flago estas disŝirita kaj tirita en la stratkoton. Ambaŭflanke estas vunditoj.

En striko de ĉinaj telegrafoficistoj interkonsento estas atingita.

SUBTENU VIAN GAZETON REGULE PAGANTE VIAN ABONON!

—

SENDU KONSTANTE ARTIKOLOJN, RAPORTOJN, UNUPAĜE SKRIBITAJN!

—

VARBU DAŬRE NOVAJN ABONANTOJN!

Kion fari dum Revolucio?

Multaj laboristoj konstatas, ke socia ŝanĝo estas necesega, tamen ili ne havas ian ajn klaran bildon, kion fari, se la ŝanĝo efektiviĝas. Estus bone, se ni povus antaŭbildigi al ni almenaŭ la plej farendajn ŝanĝojn.

Ni scias, ke la laborforto estas okupata laŭ 3 gradoj:

1. sur necesa produktado
2. sur luksa produktado
3. sur danĝera produktado

La laboro okupata sur 1. estas nesufiĉa, por produkti la minimumon de vivbezonoj, sed nur produktas por kontentigi ne la veran postulon, sed la efektivan (aĉetpovan) postulon.

Multaj laboristoj kaj iliaj infanoj bezonas bonajn botojn kaj manĝaĵojn, kaj la vera postulo ekzistas en nia nuna socio, sed ĉar ili ne havas la aĉetpovan monon, ilia bezono ne kontentiĝas. Tamen, aliflanke riĉulo, kiu ekspluatas aliajn homojn, ricevas pli da mono, ol sufiĉas por liaj veraj bezonoj, kaj havas monon neelspezatan.

Pro tio oni povas antaŭvidi, ke tuj post la socia ŝanĝo, ĉiuj laboristoj urĝe deziros sufiĉan manĝaĵon ktp. Tiamaniere pli da laboro estas koncentrenda sur punkto 1.

Multe da laborforto eluziĝas, kiu produktas luksajn varojn laŭ la postuloj de la riĉuloj. Laboristoj nun produktas luksajn aŭtomobilojn, delikatajn manĝaĵetojn ktp.

Tuj post la socia ŝanĝo, tiu laboro ne funkcios kiel nun, sed translokiĝos al punkto 1.

Ankaŭ multe da laboro nun produktas pafilojn, venengason, militŝipojn ktp. kun celo detrui la vivon de aliaj homoj. Multaj homoj estas soldatigitaj en la armeo kaj produktas nenian utilon, tamen ili devas manĝi, kio signifas, ke aliaj laboristoj devas peze labori, por ke ili restu neokupitaj.

Oni ne povas antaŭdiri, ĉu tiu laborforto restos kiel nun, aŭ ĉu ĝi ankaŭ okupiĝos en utila laboro. Tio dependas de la grado de kontraŭstaro, kiun renkontos la nova registaro de klaskonsciaj laboruloj, flanke de la antaŭaj riĉuloj kun iliaj pagataj servutuloj. Ju malpli granda estas la kontraŭstaro, despli facila estos la tasko, ŝanĝi la direkton, en kiu okupiĝas tiu kvanto da laborforto. La sama organizo kun sia disciplino povas preni sur sin novan funkcion, kaj mase labori, ĉu kulturante la teron, ĉu laborante en fabrikejo.

Ju pli da laboro konsumiĝas sur necesa, utila laboro, des pli rapide finiĝos la farenda laboro kaj sekve despli longa libera tempo restos por la laboristoj, kiuj povas okupiĝi en saniga distraĵo en ĉirkaŭaĵo, kiun ili mem difinos.

Oni kalkulas, ke la laboristoj dum 8-hora labortago laboras 2 1/2 horojn por sia salajro, kaj la sekvantaj horoj restas por la superprofito de la riĉuloj. Sub la ŝanĝata socia sistemo, la laboristoj nur laboras sur necesa laboro, do dum 2 1/2 ĝis 3 horoj kaj tiam povos vivi vere kiel homoj kaj ne kiel sklavoj, kio okazas hodiaŭ.

3398 (Londono)

Situacio en Polio

Polio, havanta pli ol 28 milionojn da loĝantoj sur teritorio de 388,328 kv. kilometroj, troviĝanta sur la teritorio okcidentparta de la antaŭmilita Rusio, ricevis sian memstarecon en la jaro 1921.

La juna pola ŝtato estas lando precipe agrikultura. La plej granda parto de la loĝantaro estas vilaĝa, nome po 1000 loĝantoj estas tie ĉi 613 personoj, kiuj okupas sin pri agrikulturo. Oni ne scias precizan statistikon pri la nombreco de diversaj klasoj kaj profesioj en Polio, sed

laŭ proksimumaj ciferoj oni povas difini, ke la proleta elemento konsistas tie ĉi el ĉirkaŭ 38,2% de tuta loĝantaro.

Kiel mi diris antaŭe, la vilaĝanaro en pola ŝtato estas faktoro plej nombra.

Tamen en Poznanio kaj Pomeranio ĝi prezentas la malplimulton de kamparloĝantaro. En Orienta kaj Okcidenta Galicio kaj en orientaj vojevodioj (gubernioj, provincoj) ĝi estas pli multnombra ne nur en vilaĝoj, sed ĝenerale inter tiea loĝantaro. La riĉa vilaĝanaro (pli ol 10 ha) estas forta nombre kaj ekonomie faktoro en vojevodioj Poznania, Pomerania kaj en kelkaj distriktoj de l' Varsovia kaj Bjalostoka. En aliaj vojevodioj, precipe en Galicio, ĝi estas tre malmultnombra. La meza vilaĝanaro en pola ŝtato estas duon-proletaro.

Kamp-proletaro dividiĝas je konstanta kaj sezone-bieneta. Bienet-proletaro grupiĝas plejparte nordokcidente. Ĝi estas rezulto de bienet-mastrumado pere de konstanta etato de kamp-servistaro, propra inventaro ktp.

En tri vojevodioj nordokcidentaj (poznania, pomerania kaj varsovia) laboras ĉirkaŭ 50% da tuta bieneta laboristaro en ŝtato.

Sendube 1924 estis la jaro de stagnacio kaj krizo en historio de pola industrio. Depost la tempo de reakiro de sendependeco ĝis la jaro 1923 ĉi-industrio rekonstruiĝadis, pligrandigadis la nombron de metiejoj kaj laboristoj, intensigis produktadon, pligrandigis vendon enlandan kaj eksterlandan. Sed komence de lastaj monatoj de 1924 komenciĝas returno: malpligrandiĝas la nombro de fabrikoj kaj laboristoj, malpliiĝas la produktado.

Sed ĉi-krizo ne estas tipa por kapitalismo perioda krizo, kiu pro nepreco sekvas disflor-jarojn. La nunan krizon oni nomis la krizo "sanacia", kio signifas, ke ĝi kaŭzos pliboniĝon en industrio. La krizon kaŭzis deturniĝo de niaj kapitalistoj de inflacia politiko. La kapitalistoj ne nur estis liberigitaj de ĉiuj depagoj, sed eĉ pere de fisko eltiradis de popolamaso kolosan depagon inflacian. Ĉi-donacajoj kaŭzis malriĉiĝon de unuaj entreprenoj kaj pliriĉiĝon de tiuj aliaj. La ĉiama pligrandiĝo de eksporto estis fakte grada forvendo de Polio al eksterlandaj kapitalistoj. Tamen nek ĉi-donacajoj nek ĉi-forvendado sufiĉus por longa tempo, se ne tio, ke samtempe pola utiligis duman paralizon de ĉefa rivalo sia — germana industrio — portanta sur si pezon de l' okupado.

Oni devas ankaŭ konfesi, ke malgraŭ plimalgrandiĝo de industria produktado, malgraŭ senlaboreco, la sanacia krizo kontraŭe al periodo de "disfloro" havas certajn signojn de stabiligo de kapitalismo. Same kiel inflacio estis rezulto de mastrumad-oportunismo, t. e. rezulto de politiko de hodiaŭa tago, sanigo de l' fisko, montras neprecon de adaptiĝo de pola kapitalismo al tute novaj kondiĉoj historiaj. Aperis demando: kio do devas esti *stabiligita*. Tiel nomata sanacio tuj mallarĝigas limojn de industria disvolviĝo kaj puŝas landon al nivelo preskaŭ nure agrikultura. Aperas demando, ĉu ĉi-reiĝo de industrio, minaca por burĝaro pro diversaj kaŭzoj, estas nur momenta, ĉu ĝuste "stabiliga"?

La problemo supre citita estas tre komplika. Nur nun estas sendube: la krizo daŭros certe sufiĉe longe. Ni staras antaŭ longdaŭra periodo de industri-stagnacio.

La unua reakcio de industriisto kaŭze de plimalboniĝo de mastruma konjunkturo estas plimalmultnombrigo de labor-tagoj de laboristoj. Iatempe laboristoj en kelkaj branĉoj de industrio, ekz. en ŝpinaj-industrio laboris nur dum 2—3 tagoj semajne.

Por prezenti al ĉiuj situacion de mastrumado en Polio, mi ĉi-sube donas malgrandan tabelon, kiu pli rakontos al ni ol senbezonaj vortoj.

Jaro kaj Sezono (kvaronjaro)		Produktado en miloj da tunoj: Karbo	Nafto	Eksterlanda komerco en milion. da sv.fr.: Imp.	Eksp.	Meznombra kvanto-da vag. ĉiutage en miloj	Serĉantaj laboron je ĉiu 100 vak. lokoj	Indikilo. Jaro 1914=1: en valoro de dolaro	de prezoj pograndaj	de vivtenkostoj en Varsovio	Kreditoj de ŝtata banko en %: Diskonta	aliaj
1920	I	1585	765	—	—	—	1450	36	—	—	0,1	3,9
	II	1567		—	—	—	397	42	—	—	0,4	2,0
	III	1670		—	—	—	198	53	—	—	1,2	3,5
	IV	1590		—	—	—	190	108	—	—	1,0	7,5
1921	I	1732	177	—	—	7,6	190	188	—	164	1,5	6,8
	II	1774	165	—	—	7,7	148	309	—	185	1,4	5,4
	III	1977	188	—	—	8,1	150	884	—	317	3,1	6,0
	IV	2089	175	—	—	8,6	186	841	604	477	6,3	7,5
1922	I	2282	161	124	51	8,2	256	903	638	431	8,3	9,4
	II	2163	181	176	81	9,4	207	983	794	638	12,6	9,2
	III	9066	193	165	192	10,3	133	1860	1283	924	14,2	5,6
	IV	8699	178	275	258	10,8	147	3804	2716	1768	15,9	7,8
1923	I	9511	174	273	303	10.5	248	9783	7869	6476	17,0	4,9
	II	8757	185	294	298	10,2	212	15943	13414	11780	16,0	8,0
	III	9536	190	264	331	10,8	171	58360	51691	43879	18,7	7,6
	IV	8294	188	285	264	10,1	182	905699	792977	621224	15,8	13,1
1924	I	8463	190	311[1]	323[1]	8,5	196	1785720	2486251	2793888	16,7	16,2
	II	7971	198	401[1]	336[1]	8,2	175	100[2]	104,6[2]	125,3[2]	30,7	4,1
	III	6766	184	291[1]	237[1]	8,9	441	100[2]	108,0[2]	134,3[2]	38,9	1,5

1) En milionoj da zloty. 2) Zloty: Jaro 1914 = 100.

Prilaboris *Halpern* (Lublin)

25 jaroj de konsumkooperativa movado en Finnlando

En la jaro 1918 la progresemaj kooperativoj fondis ankaŭ propran pograndan kooperativon: *Osuustukkukauppa r. l.* (mallongigite OTK = pogranda kooperativo). Pro civitana milito kaj pro postmilita, nenormala tempo ĝia agado dum unuaj jaroj estis malfacila. La jena vendstatistiko montras ĝian evoluon:

1918	Fmk.	14 375 206
1919	"	56 265 644
1920	"	98 837 754
1921	"	193 893 633
1922	"	318 401 409
1923	"	464 606 725
1924	"	550 392 605

La propraj kontantaj kaj garantiaj kapitaloj estas nun 32,2 milionoj da Fmk., kaj havajbilanco de lasta jaro finiĝas per sumo de 102,9 milionoj da Fmk. Ĝi havas 8 vendkontorojn, ĉefkontoron en Helsinki.

Lokaj kooperativoj aliĝintaj al K. K. povas prezenti jenan statistikon pri sia evoluo:

Jaro	Nombro de kooperativoj (anoj de K. K.)	Nombro de vendejoj	Nombro de anoj	Vendo Fmk.
1918	87	503	96 216	146 856 915
1919	94	611	120 214	265 571 743
1920	106	744	143 896	525 846 302
1921	116	859	157 705	673 074 568
1922	113	898	160 618	735 623 401
1923	113	957	172 558	844 405 091
1924	110	1044	185 338	966 884 018

La statistiko montras malkreskon sole je nombro de anoj-kooperativoj de K. K. Efektive malkresko ne okazis ankaŭ en tiu rilato, ĉar multaj malgrandaj kooperativoj estas unuigitaj al fortaj distriktaj kooperativoj.

Proprajn produktejojn havis en la jaro 1918 nur 25 kooperativoj posedante 47 produktejojn kun produkta valoro de Fmk 21,3 milionoj. En la jaro 1924 jam 60 kooperativoj havis 135 produktejojn kun produkta valoro de Fmk 150,2 milionoj.

Restoraciojn havis en la jaro 1920 18 kooperativoj kun spezo de 28,5 milionoj da fmk. En la jaro 1924 havis 38 kooperativoj 67 restoraciojn kun spezo de 48,7 milionoj da fmk.

La proprajn kapitalojn de laboristaj kooperativoj kaj evoluon de ŝparkasoj montras ĉi-suba tabelo:

Jaro	Propraj kapitaloj de laboristaj kooperativoj	Nombro de ŝparkasoj	Ŝparoj de anaro en ŝparkasoj estis Fmk.
1919	15 500 000	9	1 819 626
1920	20 500 000	30	11 324 229
1921	27 300 000	55	27 044 073
1922	33 300 000	64	42 475 501
1923	64 400 000	?	70 575 761
1924	98 800 000	71	103 464 879

Manko de propraj kapitaloj estas ĉiam malfaciliginta la evoluon de laboristaj

konsumkooperativoj. Sed lastajn jarojn ŝparkasoj de kooperativoj multe kontentigis kapitalbezonon de kooperativoj.

Laboristaj konsumkooperativoj havas ankaŭ proprajn asekurajn instituciojn. El ili *"Tulenturva"* (rifuĝo kontraŭ brulo) fondita komence de 1922 akceptas je asekuro havaĵon de kooperativoj kaj privataj anoj de kooperativoj. La faritaj asekuroj valoras 421,9 mil. da fmk.. *"Kansa"* (= popolo) por vivasekurado komencis sian agadon aŭtune 1923. Ties diversaj asekuroj jam havigitaj havas valoron de ĉ. 200 milionoj da fmk.

La supraj informoj prezentitaj pri progresemaj konsumkooperativoj en Finnlando, montras kiel vaste kooperativa movado estas disvastiĝinta en la rondoj de laboristaro. Fortega estis ĝia evoluado, kaj statistikoj asertas ĝian vivkapablon. Tial ni povas lummense komenci duan 25-jaran periodon.

Vilho Salonen (1954)

P. S. Kamaradoj, kiuj eble tradukos ĉi-artikolon kaj publikigos ĝin en nacilingvaj gazetoj, estas afable petataj, sendi minimume 2 ekz. de koncernaj numeroj laŭ adreso: *Vilho Salonen, Ryttylä* Napiala-Finnlando.

DISKUTEJO

Rilate al la artikolo: "Vivo kaj sano de laboristoj"

(S. 48)

Kun plezuro mi tralegis la artikolon "Vivo kaj sano de laboristoj" en S-ulo N-o 48 de k-do Fröding. 15 jarojn antaŭe estante preskaŭ invalido, suferante multajn malsanojn mi, spite la malpermeson de kuracistoj, ĉesis manĝi viandon de bestoj kaj fiŝoj. Post unu jaro mia sanstato pliboniĝis kaj post kelkaj jaroj mi, kvankam ne fariĝis forta, tamen jam ne estis malsana. En jaro 1919 mi ruĝarmeaniĝis. En ruĝa armeo mi estis 3 kaj duonon da jaroj ĝis 1922 (junio). La vivo de ruĝarmeanoj estis tiam sufiĉe malfacila. En ruĝa armeo mi ricevadis porcion sen viando kaj fiŝo, kiuj estis ŝanĝataj per pli granda kvanto da oleo, greno k. s. (Ĉu en ĉiuj armeoj burĝaj oni same faras?) Dum la lastaj 15 jaroj mi nur du fojojn po du semajnoj manĝis viandaĵon, kaj ambaŭ fojojn mia sano malfortiĝis. Mi pensas, ke mi ŝuldas la eblon labori nur al forigo de viando el mia nutraĵo. Do mi ne povas diri, ke mi min nutras racie. Tiu ĉi problemo (de nutrado) estas tre grava por la laboristaro (aparte en Sovetio, kie la laboristoj kun helpo de biologoj kaj *kuracistoj-sovetianoj* pritraktas la problemon pri racia sana vivo). Mi substrekas la vortojn kuracistoj-sovetianoj ĉar mi opinias, ke eĉ en burĝaj landoj ne ĉiuj kuracistoj estas tiom monavidaj kiel pensas k-do Fröding kaj inter ili sendube estas multaj sindonaj honestaj profesiuloj, do, kompreneble en Sovetio la kuracistoj, kiuj troviĝas en tute aliaj cirkonstancoj, ne estas friponoj se estas inter ili apartaj tiaj individuoj, la societo scias kaj kontraŭbatalas ilin.

Ĉe ni la plejmulto de civitanoj estas ne nur profesiuloj, sed samtempe egalrajtaj societanoj kaj la malbonstato de ĉiu malutilas al ĉiuj. Vere, nia materia kaj kultura stato estas ankoraŭ ne alta, sed ni havas la eblon senhalte kreski. Multon, tre multon ni ne scias ankoraŭ kaj ni estas tre dankemaj por ĉiu amika kamarada konsilo. Do, k-do Fröding, bonvolu konatigi nin per "Sennaciulo" pri via sperto, kiun ni senpartie pritraktos. Nuntempe la Leningrada Kooperativa Unio pritraktas la demandon de pli bona pano.

5. sept. 1925. *SAT-ano 1896*

J. Brukson.

Lingva demando en internaciaj kongresoj

(El la artikolo de finna delegito en la Marseillea kongreso)

En la ĉeforgano de finna soc. dem. partio unu el la finnaj reprezentantoj en la kongreso de socialista internacio en Marseille skribas interalie:

Unu el la negativaj flankoj de la kongreso estas ankaŭ la nekomplete solvita *lingva demando.* Kiel ni scias, la internacio permesas en siaj plenkunsidoj kaj komisionoj nur uzon de tri lingvoj. Tiuj privilegiitaj lingvoj estas: angla, franca kaj germana. La nomitaj, multe disvastiĝintaj malnovaj kulturlingvoj certe estas respektindaj, sed tamen la afero estas tia ke la limigita ebleco uzi nur tiujn tri lingvojn, donas apartan *preferrajtan pozicion* nur al la reprezentantoj de tiuj landoj, kie oni havas la nomitajn lingvojn kiel gepatran aŭ lernejan lingvon. La reprezentantoj de aliaj landoj, kvankam ili povus, se bezone, uzi (kaj eĉ bone) tiujn fremdajn lingvojn, havas ofte ĉe la gravaj disputoj malpli oportunan pozicion, kaj tute ne pro manko de sperteco, sed ĝuste pro lingvaj malfacilaĵoj. Multaj el la kongresanoj konfesis al mi, ke ili parolus en la kongreso multe pli ofte, se ili povus uzi la nomitajn lingvojn tiel bone, kiel tiuj, kies "propraj" la lingvoj estas. Kaj ni kredas, ke ankaŭ kun pli granda memcerteco kaj sukceso.

Malkontenteco pro tia "lingva hegemonio" ekaperis ofte en la komisionoj. La svedaj kaj la danaj reprezentantoj estas uzintaj en la komisionoj sian propran lingvon dum la plej gravaj diskutoj, kaj privata interpretisto faris tuj oficialan tradukon. Kelkfoje la afero estas tiel aranĝebla, sed tio ne kapablas forigi la konvinkon, ke la preferrajta pozicio de kelkaj lingvoj donas similan pozicion al la reprezentantoj, por kiuj la lingvoj estas gepatraj. *Internacia lingvo* estus do laŭ la tempo tute necesa. Alie okazos tiel, ke la potenca slava mondo kaj multaj el la antaŭaj limŝtatoj de Rusio postulas por la rusa lingvo similan rajton, kiel la lingvoj de aliaj grand-ŝtatoj posedas. Tiu reformo postulus ankoraŭ pli da valora labortempo.

Sed la lingva afero havas ne nur tiun ĉi flankon, kiu koncernas certajn privilegiojn. La neceso de lingvoscio kaŭzas tion, ke fariĝas reprezentantoj de la kongresoj tiaj kamaradoj, kies instruiteco, kompetenteco, krea forto kaj kritikkapablo povas esti malpli grandaj ol la respektiva lingvoscio. Tio kaŭzas la nenormalan aperaĵon, ke en la internaciaj kongresoj kutime povas sin prezenti kaj sekvi la diskutojn nur t. n. "sinjorecaj socialistoj". La malbonaĵo kompreneble ne estas tio, ke la kamaradoj posedantaj lernejan aŭ hejmakiritan klerecon povas partopreni la kongresojn, sed tio, ke prudentaj, spertaj memlernintaj kaj marksisme bone klerigitaj laboristoj *ne povas partopreni pro manko de lingvoscio,* ĉar ili ne povas tiel sukcese kiel la lingvosciantoj partopreni al la internacia laborado. Tiu parto en la funkciado de la internacio estas serioza. La manko de komuna lingvo estonte efikos al la aferoj des pli negative, ju pli la funkcio de la internacio havos kontakton kun *efektivaj laboristaj masoj.* Sed ĝi devas ĉiamaniere alceli tian kunlaboron, ĉar finfine la profundaj tavoloj en la laboristaro kaj t. n. frontuloj kaj ĉe la fronto kleriĝintaj kaj kleriĝantaj laboristaj masoj formas en la socialista mondo la *suverenan plej altan volon,* kiu donas direktivojn, forton, aŭtoritaton kaj fervoron al ĉiuj organizajoj de la partio kaj per ili *ankaŭ al la funkciado de la internacio.*

Trad. 2118

Konstruu la proletan kulturon per esperanto!

Ĉiu reganta klaso havas sian kulturon. Havis sian kulturon la feŭdalismo, havas la sian kapitalismo. Sed la plej multenombra klaso ankoraŭ ne havis sian kulturon, ĉar ĝi ĝis nun ne havis la potencon.

Sed nun la proletaro havas en sia potenco unu sesonon da areo de l' tero. En Sovetio la proletaro jam konstruas sian kulturon.

Ni, gek-doj, konstruu la internacian (pli akurate ni diru: *sennaciecan*. Red.) proletkulturon per esperanto!

Antaŭ ĉio ni devas havi nian vidpunkton je lingvaj demandoj, kiel diris k-do Krjukov. Ni ne timu, se tiel nomataj neŭtralaj esperantistoj nomos nin apostatoj, se ili parolos, ke ni apostatis de l' principoj de Zamenhof. Nur ni bone memoru, ke laŭ Zamenhof la ĉefaj reguloj de esperanto estas: kompreneblеco, facileco kaj simpleco. Kaj li entute ne opiniis, ke esperanto dum sia ekzistado ne ŝanĝos.

Do, ni, kamaradoj, konstruu la proletkulturon per esperanto!

Petrovski (5048)

EL ANGOLA

Vivo kaj moroj de indiĝenoj

III

Familia vivo — Geedziĝo

Koncerne la familian vivon, la moroj de la indiĝenoj estas ankaŭ tre malsamaj. Tiu malsameco montriĝas eĉ en unusola distrikto, kiel ekzemple en tiu el *Sud-Kuanza,* kiun mi nun pritraktas, sed ĝi estas rimarkebla pli multe en la detaloj ol en sia esenco mem.

La virino, ĝuanta plenan liberecon antaŭ la edziniĝo, nur ĉesas esti la ino facilinklina al voluptemo post kiam ŝi fariĝas edzino. La perdo de la virgeco ne signifas malhonoriĝon. La facileco kun kiu ŝi, dum la fraŭlineco, disponas el siaj ĉarmoj kaj disdonas siajn karesojn, ankaŭ ne malnobligas ŝin.

La familio organiziĝas sub formo de kontrakto, en kiu la virino estas la aĵo akirita. La viro povas posedi tiom da virinoj, kiom lia aĉetpovo al li permesas. Tio tamen ne devas esti nomata poligamio sed *kromedzineco,* ĉar la edzino, la unua virino, havas superecon, aŭtoritatecon super ĉiuj ceteraj. La edzino, en sia kondiĉo de sklaveco, de ilo, eĉ ne povas manĝi kun la edzo. Edzino kaj propraĵo estas vortoj preskaŭ sinonimaj; la viro estas konsiderata tiom pli riĉa, pli altgrada, kiom pli granda estas la nombro de virinoj, kiujn li posedas.

Inter la *Ba-Sumbe* la edzinpeto estas farita de la onklo de l' pretendanto al la patrino kaj patrinonklo de la amindumitino. La petanto devas kunporti botelegon da vino kun laĉligita naztuko, rulpecegon da drapo kaj ses botelojn metitajn en "kinda" kiujn kovras alia naztuko. Se la donacaĵo estas akceptata, per tio la geedziĝo estas konsentata. En la "libata" de la fianĉo tuj estas konstruita la "kubata", en kiu la paro devas loĝi. La fianĉino estas akompanata de la onkloj al la gepatra loĝejo de la fianĉo kun rekompenca donaco el trinkaĵoj ankaŭ metita en "kinda" kaj kovrita per naztuko. Kaj, post la koncerna festeno interfamilia, la geedziĝo perfektiĝas.

La indiĝeno *Ba-Pinda* petas mem de ŝiaj gepatroj la fraŭlinon kiun li elektis kaj, se tiuj konsentas, la geedziĝo okazas post iom nelonge kontraŭ la koncerna donacaĵo, kiu iam konsistis el du rulpecegoj da drapo kaj nun varias inter 30 kaj 60 eskudoj.

Ĉe la *Ba-Sele,* estas ankaŭ la pretendanto mem, kiu prezentas la peton, akompanata de iu parenco aŭ amiko. Sed li devas adresi sin al la plej intimaj onkloj de la belulino. Ĉi-tiuj konsultas la elektitinon kaj, se ŝi emas al edziniĝo, tuj la onkloj komunikas la fakton al ŝiaj gepatroj, kiuj ĉiam agas laŭ la volo de tiuj siaj parencoj. Tiam la fianĉo vizitas la loĝejon de la fianĉino, kunportante donacaĵon el 4 metroj da drapo kaj du naztukoj, kiun li oferdonas al sia estonta bopatrino rezervinte unu el la naztukoj por ties patrino, se ŝi ankoraŭ vivas. Interkonsentinte pri la tago de la unuiĝo, la fianĉino marŝas kun ia amikino en la domon de la fianĉo, kiu sin trovas ankaŭ kun iu amiko kaj tiam okazas la unua geedziĝa festeno konsistanta nur el "funji" (kaĉo el maiza faruno — "fuba") kaj speciala manĝaĵo farita per folioj de fazeolo kaj palmoleo. La fianĉo ne povas eĉ tuŝi tiujn manĝaĵojn. Je la dua tago la festeno konsistas el spicitaj fazeoloj; je la tria, el kokino; kaj, je la kvara tago oni mortigas kaprinon, kiun la edzino donace portas kun la "funji" al siaj gepatroj. Ĉi-lastaj rekompencas ŝin per similaj manĝaĵoj kaj la ceremonio estas finita.

Inter la *Ba-Nanu* du amikoj de la fianĉo petas la fraŭlinon de ŝiaj gepatroj, por kio ili estas akompanataj de knabineto. Ili kunportas la donacaĵon — 4 metrojn da drapo —, kiu, se akceptite tuj estas rekompencata per la livero de la fianĉino mem. Ĉi-tiu, akompanata ankaŭ de knabineto kaj de du amikoj de l' patro iras en la "kubata"n de l' fianĉo, kie tuj komenciĝas la festenoj: — la unuan tagon, kokino kaj kelkaj potoj da "kimbombu" (biero el maizo); la duan, porko; la trian tagon, la kunsekvintaro de la fianĉino returnas en la hejmon de ŝiaj gepatroj kunportante porkon — donacon de la edzo al bogepatroj. Du semajnojn poste, la edzino vizitas la gepatran domon kaj returne al sia nova hejmo kunportas la rekompencon de l'donacaĵo — alian porkon kaj unu "kinda"n plenan je "fuba".

Por la *Amboini*-aj indiĝenoj la amindumado havas interesajn regulojn de ĝentileco. La fraŭlo iniciatas la *konkeron* petante la pipon [1]) de la preferitulino. Renkontiĝante denove kun ŝi, li petas tabakon kaj adresas al ŝi la unuajn voluptemajn madrigalojn. Se, post kelkaj tagoj, la fraŭlino ne postulas retrodonon de la pipo, la gefianĉiĝo estas konsentita, kaj li komencas vizitadi ŝian familian "kimbunda"n (dormokabano por ĉiuj fraŭlinoj de la familio). Post konsento pri la dato de la geedziĝo, li sendas al ŝia familio kelkajn amikojn kun la koncerna donacaĵo konsistanta el du klaftoj da drapo kaj unu botelo da brando. Tuj la fraŭlino estas alvokata antaŭ la familion por malfermi sian koron, sed la uzado postulas, ke ŝi konservu la lipojn ĉastece fermitaj . . . La botelo da brando estas tiam malŝtopata, kaj la unuan glason oni oferdonas al ŝi. Se ŝi trinkas, ŝi tiamaniere jesas, kaj tuj oni mortigas kaj kuirigas kokinon, kiu estas oferdonata al la komisiitoj, kaj komenciĝas la ĉasteca zorgemo de la fianĉino. Iom post nelonge okazas ĉe la fianĉo la geedziĝa festeno, por kio oni preparas du kokinojn, kiujn la fianĉino ne povas manĝi; ties parto estas sendata al ŝiaj gepatroj, kiuj rekompencas per kaprido. Post kelka tempo, la edzo devas plue kompensi siajn bogepatrojn, sub formo de donacaĵo, pro tio, kion ili nomas *la manĝaĵoj kaj vestaĵoj* de la filino. (Daŭrigota).

[1]) Ja, la indiĝeninoj el Angola fumas tiel, kiel la viroj aŭ eble ankoraŭ pli multe. Ili uzas grandajn pipojn kaj plenigas ilin per fortega nigra tabako.

Ministraj insultoj

Francoj estas feliĉegaj havi respublikan registaron. Post jaroj dum kiuj regis la "naci-bloka" registaro, estas nun sendube dolĉe kurbiĝi sub ordonpovo de demokrata ministraro, kiu nur celas popolan feliĉon, justecon kaj egalecon, pacon kun aliland-aro (? — ekz.: rigardu al Maroko . . .) kaj enlandan sociordon. Ha! tiu respekto je sociordo estas iomete dia por maldekstra-blokuloj. Unu el belaj ornamaĵoj de nuna registaro estas ministro por publika instruado, sinjoro de Monzie. Prijuĝu! Kaj vi diros, se la unua linio de ĉi-tiu artikoleto ne estas vera, se precipe la geinstruistoj ne estas la plej feliĉegaj . . .

En freŝdata cirkulero, sinjoro de Monzie skribas: "Kelke da instruistoj, uzantaj civitanan liberecon, kiun neniu respublika registaro rifuzos al ili, sin miksas en ĉiujn perfortojn de l'komunista propagando."

Kaj pli malsupre, li aldonas: "Ne prezentiĝas al la penso de iu ajn, akcepti ke maldelikateco de sintenadoj aŭ diraĵoj, publika kutimo de mensogo, cinika maldecemo de skribaĵoj aŭ sintenadoj povas akordiĝi kun la alta misio de primaria (unuagrada) instruisto".

Ankoraŭ neniam, ministro, eĉ dum periodo de subpremo, maltimis montri tiajn sugestojn kontraŭ la revoluciaj instruistoj, tiuj maldelikatuloj, tiuj mensogistoj, tiuj maldecemuloj!

"En urĝa okazo — diras la ministro al rektoroj kaj al la departementaj inspektoroj, kiel konkludo — la prefekto (departementestro) konigos al vi la instrukciojn pri la sociordo . . ."

"Estas do komplete! Painlevé-a ministraro — se ĝi daŭras iomete da tempo — sukcesos superi ĉiujn rekordojn sur la vojo de reakcio.

Glay mem — unu el la sekretarioj de l'reformista sindikato de instruistoj — opinias, ke ĉi-tiu cirkulero estas "neatendita", kaj parolas kontraŭ la malmildegeco de hierarĥio kaj la subprema politiko.

Estus pli bone konigi la nombron kaj la nomojn de geinstruistoj, kiuj, en sia lernoĉambro, politike propagandis. Nu, ĝis nun, ni konas neniun riproĉindan okazon.

Sed franca instruistaro revolucia estas plene informita. Ĝin oni ne indulgos . . . La registaro de maldekstra bloko, kiu havis en sia programo — antaŭ lasta voĉdono! — la opiniliberecon por la ŝtatoficistoj, tuj akceptos la prirespondon de l'komenco de oficiala cirkulero de unu el la antaŭuloj de sinjoro de Monzie: "Dum sia publika vivo, neniam ŝtatoficisto estas liberigita el siaj profesiaj devoj kaj el obeemo kontraŭ siaj superuloj".

Via ekscelenca moŝto, ni ne respondos al viaj insultoj per insultoj. Nia maldelikateco, nia cinika sentemeco malpermesas tion al ni.

Johano 1771.

KRONIKO

Germanio

La 27. sept. 1925 okazis en Bertsdorf bone vizitata konferenco. Ĉeestis delegitoj el Seifhennersdorf, Großschönaŭ, Bertsdorf, Sommeraŭ, Reichenaŭ kaj Zittaŭ. Waltersdorf sendis skrib. rap. Kursoj laŭ rekta metodo estas malfermitaj en Seifhennersdorf (19 gek-anoj) kaj en Olbersdorf (28 gek-anoj) gvid. k-do Scherbaum. Krom tio okazas kursoj novaj laŭ lernolibroj en Seifhennersdorf (14 gek-anoj), Leutersdorf (25), Sommeraŭ (6), Zittaŭ (55). K-do Lehmann, Dresdeno, raportis pri nia V. kongreso tre detale kaj entuziasmige. Pri organizafero ekiĝis vigla diskutado. K-doj Lehmann, Scherbaum kaj Guhr proponis ke ĉiu distriktano aniĝu al SAT kaj el ĉiu grupo po unu k-do al LEA. La klariga raporto de k-do Scherbaŭm pri SAT estis preskaŭ unuanime aprobita. "Preskaŭ" pro tio, ĉar la Zittaŭa grupo eksiĝis el nia SAT distrikto por aniĝi al LEA. Nia celo restu: Esperanto en la servon por la proletaro. La konferenco decidis postuli eksigon de iamaj gekamaradoj ĉe SAT kaj LEA: ĉar ili nur malhelpas nian movadon. Malgraŭ tia malĝoja afero, nia distrikto nun progresas, precipe, ni atingis nian deziron, ke ĉiu distriktano aniĝos al nia sola necesega organizaĵo SAT.

H. Scherbaŭm 1378
Artur Guhr 4247

Britio

Manchester. 29. aŭgusto 1925. Okazis la unua konferenco de SAT-anoj en Britio. Post kantado "Ruĝa Marŝo" gvidita de k-ino Dunn la grupestro k-do Frank Elder, bonvenigante la anojn malfermis konferencon. Urboj reprezentiĝis jenaj: Manchester, Altrincham, Salford, Handforth, Nelson, Batley, Sheffield, Liverpool. Estis elektitaj: prezidanto k-do Burden (el Batley), sekretario k-dino France, Manchester.

Post raporto pri stariĝo de SAT-grupoj en Britio kaj pri cirkonstancoj rilate la nunan entreprenon, la sekvantaj punktoj rezultis jenon;

Pri konferenco mem: Ĉu ni akceptu? jes — pri titolo: konferenco de SAT-anoj en Britio — pri celo: unuigi SAT-anojn disvastigi propagandon de SAT en granda Britio — pri kunveno: Ĉu ni kunvenu jare? jes — pri necesa konsilantaro kaj elektitaj per baloto. Elektiĝis 6 anoj, nome:

Gek-doj Spiller, London; France, Manchester; Elder, Manchester; Burden, Batley; Starr, London; Limouzin, London.

Rezulucioj

Nur el la plej gravaj, mi citu la plej esencajn punktojn:

1. Proklamite ke ni, la SAT-anoj ĉeestantaj la unuan konferencon de SAT-anoj en Britio, elkore aprobas la laŭ grup- kaj laŭ tendencan organizformon. Okazis varma diskutado. Prezidanto opiniis ke, ĉar kongreso (Wien) ne ŝanĝis statuton, nia konferenco ne povas akcepti.
Sekretariino sugestis akcepton kiel rekomendon al proksima kongreso.
K-do Roberts referis al *samdevena* rezolucio n-o 2, dirante la dua kontraŭas, eĉ mortigas la *unuan sekve, tuj oni analizis* ambaŭ.

Pri SAT kaj naciaj prolet. asocioj.

2. Pro tio ke SAT baziĝas kaj funkcias laŭ mondskalo ni, la SAT-anoj ĉeestantaj la unuan jarkonferencon de SAT-anoj en Britio malaprobas al la naciaj asociaj prolet. espistoj kaj konsilas al SAT-anoj ĉie ke ili apogu sole al SAT ĉu *morale ĉu monrimede*.

Ambaŭ rezolucioj perdiĝis.

3. Rezolucio ke SAT-organizu studkursojn sub propraj aŭspicioj cele varba propagando — akceptiĝis.

4. Pri informaparato:
Propono ke ni elektu k-dinon Limouzin kiel ĝenerala oficiala raportantino por nia SAT-organizaĵo — aprobiĝis.

K-do Frank Elder dece dankis al prezidanto kaj aliurbaj ĉe-estantoj kiuj helpis al ni fari grandsukcesan konferencon, kiun li fermis, kune kantantaj "La Internacio". *Beatrice L. France* (Sek.).

Rusio

Stalingrad. Inter la geinstruista alilanda delegitaro, traveturinta la urbon 15. sept. estis SAT-ano k-do E. Françon, kiun renkontis kaj salutis prezidanto de loka grupo. La interparolo montris unuecon de l' SAT-spirito inter diverslandaj SAT-anoj kaj ankaŭ praktikan uzeblecon de Esperanto por unuigo de l' tutmonda proletariaro. Ankoraŭ saluton kaj bondeziron al k-do Françon kaj ankaŭ al Lyona SAT-grupo, kies membro li estas! *2148.*

La 2. ĉi-jara SAT-Konferenco de Rejnlando kaj Vestfalio

okazis la 27. septembro 2 1/2—6 1/2 horo posttagmeze en popoldomo, Severinstrato en Köln, sub prezido de k-doj: *Remers* (Düsseldorf) kaj *Cierpka* (Köln). Ĉeestis ĉ. 80 gek-doj el diversaj rejnlandaj-vestfaliaj urboj. Ŝvabaj gesatanoj estis salutintaj telegrame nian konferencon kaj dezirintaj fruktodonan sukceson. Al ili nian koran dankon.

K-do *Remers* malfermis la konferencon esprimante sian bedaŭron, ke la invitita belga k-do *L. Bergiers* ne povis veni por referati pro manko da libertempo.

K-do *Schmitz* (Solingen) raportis pri la Viena SAT-kongreso.

K-do *Ŝtankeviĉ* (el Bulgario, nun en Niedermerz ap. Jülich) referatis en scienca kaj interesa parolado pri la kulturtaskoj de l' SAT-anaro. Interalie li diris: Dum la evoluo de l' klasbatalo samtempe ankaŭ la spirita progreso de la laborklaso senhalte marŝas. SAT estu la elito el la kulturorganizaĵoj laboristaj. En ĝi ni eduku nin mem al pleja klaskonscio kaj sennaciismo. Ni estu SAT-anoj ne nur kun la jarlibro en la manoj aŭ por vidi unu la alian; ni laboru por niaj idealoj! Ni estu *veraj* SAT-anoj!

K-do *v. d. Heid* (Dortmund) kompletigante: Ni parolas pri kulturlaboro sidante antaŭ glaso da biero kaj en aero grizega pro nikotinfumo. Jen kampo, sur kiu ni komencu plenumi niajn plej urĝajn kulturtaskojn.

K-do *Petersen* (Köln): Laŭ mia opinio la teruraj sekvoj de alkoholismo kaj nikotinismo radikas en troa manko de memdisciplino. Ni eduku nin mem kaj niajn samklasanojn al pleja memdisciplino. Cetere, la plejmulto da abstinenculoj jam estas kaptata de la ftiza malsano (tuberkulozo aŭ a.).

K-do *Schwenk* (Essen): Abstinenco estas problemo ĉefe por la junularo. Ni komencu kaj ne paroladu sidante antaŭ plena glaso. Ni estas abstinenculoj, ĉar ni estas veraj laboristoj.

K-do *Burger* (Essen): Laŭ mia opinio alkoholo kaj nikotino estas venenoj por la cerboj de la laboristaro.

K-do *Remers:* Ni ne forgesu k-don Ŝtankeviĉ.

K-do *Petersen:* K-do Ŝtankeviĉ diris, ke SAT estas kolektiva organizaĵo. Rigardu Eld. Fakon; ĝi vendas akciojn. Oni povas aĉeti tiom multe kiom oni volas havi (se oni havas monon). Ĉu ĉi-agmaniero ne estas kapitalisma?

K-do *Remers:* Estas vere, ke Eld. Fako vendas akciojn. Sed alimaniere la eldonado de libroj ktp. estas neebla. Mi memorigas pri aliaj laboristaj konsum-kooperativoj; ankaŭ ili havigas al si la monon necesan per akcioj.

K-do *v. d. Heid* referatis pri la problemo: Ĉu SAT-ano devas esti ano de nacia lab.-esp-a organizaĵo? Ni scias, kion SAT celas. Sed kion LEA (Lab. Esp. Asocio germl.) kiel nacia asocio celas? Ĝi volas propagandi Esp-on inter la germana laboristaro. SAT ne povas preni sur sin tian laboron. En nacia organizaĵo la lernanto estu edukata, por ke li fariĝu poste vera sennaciulo kaj SAT-ano. Ni estu singardaj kaj ne konstruu grandan organizaĵon tute putran. Ni ankoraŭ bezonas la naciajn organizaĵojn kaj ili estos superfluaj nur ti-kiam Esp-o estos enkondukata en la popollernejojn.

K-do *Ziele* (Solingen): Aŭ mizera vivstato aŭ senlaboreco ofte malpermesas al laboristo kotizi du organizaĵojn.

K-do *Remers:* K-do v. d. Heid certe respondos: trinku glason da biero malpli ol kutime.

K-do *Ŝtankeviĉ:* Ankaŭ mi akceptus la proponon de k-do v. d. Heid; sed ni ne povas devigi la k-dojn aliĝi.

K-do *Welter* (Köln): Ni ja ankaŭ bone povas propagandi per tradukaĵoj el niaj SAT-gazetoj.

K-do *Schwenk:* Ni devas atenti ankaŭ la lokajn cirkonstancojn. En nia urbo la plejmulto da Esp-istoj estas senlabora. Pro tio SAT devas akcepti ankaŭ aspirantajn membrojn.

K-do *Petersen:* SAT jam faris porpropagandan laboron. Mi nur memorigu pri *Petro* (internacia lernlibro). Cetere la koro de l' propagando estas la grupa vivo. Ni persone propagandu kaj interrilatu kun la redaktejoj de nacilingvaj gazetoj.

K-do *v. d. Heid:* (finparolo) La kotizo (pomonata) estas 0.25 g. mk. — LEA liveras al membroj gazeton senkoste. Ĉu ni povas propagandi sole per SAT-jarlibro? Kio estas 3 1/2 mil da membroj? Ni devas montri masojn. Kaj ni devas havi ankaŭ materialon porpropagandan. La etaj grupoj kaj la soluloj nesciantaj ion pri SAT ne povas propagandi pro manko de mono. LEA liveras al ili la materialon. Kaj ni devas havi nacilingvan presservon. Artikoloj plejofte flugas en paperkorbon. Sed se organizaĵo prezentas artikolon, la bildo certe havas tute alian koloron. SAT kaj la naciaj organizaĵoj celas la samon sed devas iri diversajn vojojn. Ni eniru la naciajn organizaĵojn kaj tie ni varbu por SAT. Ni iru tien, kie estas nia sango kaj nia karno. Kaj koncerne la kotizon mi scias bonan fonton, el kiu ni povas preni la mononnecesan por kotizi: ĉu ĉiuj k-doj plendantaj pri manko de mono jam eksiĝis el la eklezio? — — — SAT kresku kaj nia spirita evoluo marŝu!

Diversaĵoj:

K-do *v. d. Heid:* Estus dezirinde, ke ni regule okazigu niajn venontajn konferencojn kaj sufiĉe frutempe fiksu la daton de l' kunveno por povi sufiĉe prepari ĝin.

Essen-a SAT-anaro okazigos venontan konferencon en sia urbo. Ĝi samtempe okazigos ekspozicion poresperantan, kaj petas la helpon de l' gek-doj por sukcesigi ĝin. Dato: meze de januaro 1926.

K-do *Petersen:* Ĉu SAT-ana Esp-o-instruanto rajtas postuli monon. En Köln fakte ankaŭ la lab. lernantoj devas pagi por kurso (8 g. mk.), SAT ja ankaŭ salajras 2 oficistojn.

K-do *v. d. Heid:* La salajrataj 2 oficistoj devas labori *dumtage* por nia afero. Por ilia dumtaga laboro ili devas esti salajrataj, ĉar ili ja ne povas labori aliel. Sed ili ankaŭ ĉiuvespere laboras senpage ĉu en la grupoj ĉu por propagandi ktp. — En Dortmund mi kapablis interesigi por nia afero ĉ. 150 lernontojn. Se mi nun postulus monon, do certe ne pli ol 10 laboristoj volus lerni la lingvon. Vi povas postuli monon, sed: ĉu nia movado gajnos pro tia agmaniero?

K-do *Petersen:* Ĉiu laboro meritas esti rekompencata. Kaj la mono bone povas esti uzata por grupelspezoj ktp.

K-dino *Adrian* (Köln): 8 mk. ja ne estas ega sumo. Kaj se laboristo serioze deziras lerni la lingvon, li ankaŭ havas la monon.

K-do *Burger:* En Essen estas neeble postuli monon pro ega mizero kaj senlaboreco. Kaj ĝuste la senlaboruloj havas sufiĉe da tempo por lerni. Ĉu ni nun postulu monon?

K-do *Petersen:* Ili ja povas pagi laŭpove.

K-do *v. d. Heid:* admonas nin ĝuste prononci. Ekz.: oj ne estas ö kaj aj ne estas ee.

Ni fine kantis “Internacion“ kaj “Fratoj al sun', libereco!“ *L. Heinrichs* (4167).

Je memoro de la 400jara datreveno de l' kampulbatalo apud Böblingen 1525

Je la 19. julio 1925 la sindikat-kartelo de Böblingen solenis ĉi-datrevenon per granda demonstracio; ĉeestis 18 veturiloj montrantaj scenojn el tiu epoko, interalie, la ŝlosil-transdonadon de Breitschwert, la bruligon de Nonnenmaher, scenon kun kaptitaj kampuloj, kaj ornamitan veturilon kun laboristoj kaj etkampuloj sub la signo

falĉilo kaj martelo.

Aŭskultu, kia estaĵo tio estas?
Multekosteco, pezaj ŝarĝoj premas teren
la kampulon kaj “simplan viron“.
Aŭskultu, kia estaĵo tio estas?

De pastrar' kaj nobelar' ni resaniĝi ne povas! — Ĉi signalparolo de la Bundŝu [1]) — ribeluloj el la Nigra arbaro estas ĉiuloke la profunda ĝemo de la subpremata popolo. Oni skribas 1525 p. Kr.

Jam de longe estas malaperinta ĉi-epoko, kiam la kampulo de la pra-epoko, ne konanta parazitajn suverenojn, trapasis la arbaron, puŝante la ŝtonpinton de la lanco en la koron de ĉasbesto aŭ frakasis al ĝi la kapon per la ŝtona hakilo kaj, dankante al la ĉasdio, ĝuis la sukceson de sia laboro en la familia unuiĝo. 4000 jaroj jam forpasis dume. Hodiaŭ nur la grandsinjoroj kun granda monujo kaj ekleziuloj havas la privilegion je la ĉasa ĝuo. La kampulo ĝin devas toleri, kiam la aproj el la Nigra arbaro aŭ Schönbuch [1]) invadas liajn kampojn, dezertigas ilin, detruas dum unu nokto la tutan dumjaran laboron de la kampulo. Bonvole estis konsentite antaŭ jardeko, ke la kampulo povu forpeli la birdojn el sia vinberejo, sed nur per pajlpupoj kaj — huŝ, huŝ! [2]) Promesite estis ankaŭ, ke ne plu tiom da ĉasbestoj povu plimultiĝi, t. e. ke la konsisto de la ĉasbestoj plimalgrandiĝu, sed pri tio la grandsinjoroj tute ne sin ĝenas: la malutilajn ĉasbestojn pafi aŭ ĉasi ne estas permesite al la kampulo. Sed por la sinjoroj nutri kaj flegi la ĉashundojn estas al li diktite. Ve, kiam iafoje tia ĉashundo mortaĉas, la kampulo estas kulpa, li estas respondigata pro tio. For estas tiu epoko, dum kiu la paŝtisto de la tribo paŝtis la komunan brutaron sur la paŝtejo, la tribo komune mastrumis la kamparon, supren al la altaĵo portis la rikolt-provizon por la dumvintra sezono, por en la blokdomo festeni de aŭtuno ĝis printempo ĉe la rikoltaĵoj de la komuna dumsomera laboro kaj ĝojigi Wotan [3]) per riĉa oferado. 2000—500 a. Kr. Hodiaŭ, 1525, sur tiu altaĵo troviĝas la kampurbeto Böblingen [4]).

La sinjoroj venas! — Kampulmizero! En la jaro 496 estas venkitaj la Alemanoj de la Frankoj. Kun la ekspluatado kaj subpremado la Frankoj alportas — kiel la Romanoj — ankaŭ Kriston, la kristan religion, ĉar ankaŭ ili ekvidis en la Kristana doktrino la plej bonan stultigilon por humiligi la ĝis nun ankoraŭ idolan kampulon. Ni nun trovas ĉi tie riĉajn nobelojn, la princan vogton [1]), eklezi-kanonikojn, kiuj ĉiuj elsuĉas la en malvastaj domoj loĝantan „simplan viron“ kaj kampulon. Centoj da kaptiloj minacas la “simplulon“ ĉiupaŝe, la grandsinjoroj estas farintaj paragrafojn, tiom, ke ilia malatento tute ne estis evitebla. Pagu, kampulo! pagu, mizera metiulo. La grandsinjoroj bezonas monon. Se vi ne povas pagi, tiam vin ĵetas la juĝeja servisto en la “verdan turon“, kiu kune kun la kastelo vin ĉiuhore alvokas: Vi estas servutulo, la libereco de viaj prauloj estas for.

Tiel, kiel en kaj ĉirkaŭ Böblingen, estas ĉie la sama fakto. Ne senmotive demandis tiam la kampulo de 1525:

Kiam Adamo fosis kaj Evo ŝpinis,
Kie do tiam pastraĉ' kaj nobelo estis?

Aŭ alia:

La kampul' je la loko de bovo estas,
Nur ke kornojn li ne havas.

La eklezio havas bonan stomakon, episkopoj, abatoj havas sian korton, manĝegas, drinkegas, diboĉas kun belaj vestaĵoj, luksaj domoj k. t. p., — ĉio, kion ili estis vidantaj ĉe la papa kortego, estas multekosta, — kiu ĝin pagu? La kampularo, la tiama proletaro. (Daŭrigota.)

Kompilis: *H. N. (511).*

---

[1]) Bundschuh (elp. Bundŝu'), organizaĵo fondita 1493 en Alzaco.

[1]) Regionoj en suda Germanio.
[2]) Interjekcio incita.
[3]) Elparolu: Votan = antikva germana dio.
[4]) Urbeto proksime de Stuttgart (elp. Beblingen).

[1]) Elparolu: fogto = kuratoro, sed pritaktante mezepokajon germanan, ĝi pli precize esprimas la mezepokan karakteron.

SUPLEMENTA PAĜO AL
"SENNACIULO"
N-o 3 — 15. OKT. 1925

LA LERNANTO

Kapitalismo, Militarismo kaj Religio estas la Triunueco kiu subpremas Proletarion

PRINCINO

De Tom Anderson

Tre malmultaj el vi geknaboj havis la okazon vidi veran princinon. Vi ĉiuj aŭdis pri ili en viaj fabellibroj.

"Ho princino", knabineto ekkriis; "ŝi estas mirinda; ŝi estas bela. Ĉu ŝi estas feino? De kia mondo ŝi venas? Ho se mi nur povus vidi princinon, estus tiel belete."

Knabineto, knabineto, princino same kiel princo, reĝo aŭ reĝino, lordo aŭ lordino, duko aŭ dukino, barono aŭ baronino, markizo aŭ markizino, estas parazitoj laŭ la sklavec-tradicio je la mensoj de "la ligno-hakistoj kaj akvo-ĉerpistoj".

Princino ne estas feino; ŝi ne estas mirinda, nek estas ŝi bela; ŝi ne estas farita el pura oro. Se ne pro ŝia bela vestaĵo, oni povus erari ke ŝi estas lavistino. Ŝi havas belajn vestaĵojn, centojn da vestoj, botoj kaj ŝuoj, bluzoj kaj ĉapeloj. Ŝi havas pli da tiuj objektoj dum unu mallonga sezono ol ĉiuj knabinoj en ĉi tiu lernejo havos dum sia tuta vivo. Ŝi havas mirindajn perlajn kolringojn, kiuj valoras milojn kaj milojn da sterlingoj. Ŝi havas sur siaj fingroj ringojn kiuj ekbriletas kiel steloj; ŝia subvestaĵo kostas pli ol tiu de mil laboristinoj. Ŝi havas ĉiujn tiujn ajojn ĉar ŝi estas princino, kaj princino estas nur parazitino. Ŝi havas grandan nombron da gesklavoj por sekvi ŝin, kaj tiuj malfeliĉaj gesklavoj estas nomitaj superaj gesklavoj pro la alta honoro sekvadi princinon. Ili lavas kaj vestas ŝin, deprenas ŝian vestaĵon kaj metas ŝin en la liton; ili faras ĉion por ŝi kvazaŭ ŝi estus infaneto novnaskita. Ili manĝigas ŝin kaj staras apud ŝi ĝis ŝi estas fininta, kaj ĉiu deziro de la princino estas plenumata tuj. Se la princino levas sian manon kaj signas sklavon, la sklavo rapidegas al ŝi tuj. Se la princino estas malsana, la plej lertaj doktoroj estas vokataj; ĉiuj grandaj gazetoj en la lando proklamas depeŝe al la plej malproksimaj partoj de la mondo. Kiam ajn la princino ridas ili fotografas ŝin. La princino parolas al malriĉa virino kies edzo estis mortigita en la milito. La princino prenas etulon en siajn brakojn en unu el la ŝirmejoj por la senhejmaj. Kiam la princino edziniĝas estas bezonataj 15 pastroj por edzinigi ŝin; la stratoj kiujn ŝi preterpasos estas ornamitaj. Festo estas proklamita por la infanoj de la sklavaro por ke iliaj cerbetoj estu impresitaj per la grandeco de princino; ĉiuj grandaj homoj de la lando ĉeestas la geedziĝon. Ĝi estas granda kaj mirinda afero; tiel granda kaj mirinda ke ĝi igas la sklavojn forgesi iliajn malriĉecon kaj mizeron, kaj ili enviciĝas sur la vojo en siaj ĉifonoj kaj mizereco ekbruadante, "Ĝojon kaj feliĉecon al la princino", kaj la princino ridas. Nenia miro! Ĝi estas grandega ŝerco. Ĉiuj homoj ĉe la granda ceremonio ridas pro la malfeliĉaj sklavoj, pro ilia infansimila naiveco.

La sklavoj rerampas en siajn hejmojn, kaj iliaj pastroj diras al ili ke tio estas la volo de dio kaj la sklavoj estas kontentaj.

El la angla trad. *Ida Rosenthal.*

Ĉiu havas sian guston

(Fablo de Demjan la Malriĉulo)

Dum la printempa tago varma
Kaj belega
Ĉevalo ia kun la pork'
Sufiĉe malpurega
En korto promenadis
Por profito
Kaj la gazeton forjetitan
Okaze en angulo ili trovis.
Ĉevalo legi iom povis
Kaj por la kara amiketo
Jen kion ĝi komencis legi
En gazeto:
"Sufiĉe ni toleris perfortadon,
Malsaton kaj senhontan
Insultadon
Kaj unu nun por trovi al liber'
Vojeton: . . ."
— "Do ĉesu! Interrompis pork'
Jen trovis vi . . . "gazeton".
Ĝi estas tute plenigita
Per ia
Abomena Sensencaĵo,
Sed pri plej inda en la mond'
En ĝi nenio
Skribita estas pri la rubo
Kaj la kuirejrestaĵo!"

Tradukis el rusa *P. Aleksandrov.*

La konsekvenca knabo

Sao

Sur larĝajn stratojn falis la sunradioj. Ĉio estas bone prizorgita ĉi tie, ĉar estas tiu urbparto, en kiu loĝas la riĉuloj, kaj ili pagas pli multe da impostoj ol la malpli riĉaj homoj. Oni almenaŭ diris al ni tiel jam en la lernejo. Sanaj infanoj ludis ĉie, kaj jen multaj knaboj marŝe alproksimiĝis, vestitaj kvazaŭ soldatoj. La manetoj tenis pafilon kaj la sabroj, kiuj pendis ĉe la maldekstra flanko, ĉiam laŭtakte moviĝis tien kaj reen. Forte sonis malnova soldatkanto: "soldata vivo, plej bela vivo". La plenaĝuloj, evidente la gepatroj rigardis, ridis sate — "jes, niaj infanoj". Iom flanke staris ĉifone vestita knabeto. Pala estis la vizaĝo. El la laborista kvartalo li venis pro la bela vetero. Trankvile li rigardis la ludadon kaj ĝuste tiam, kiam la plej granda el la ludantaj knaboj kriis: "Ekpafu!" li vidis per siaj spiritaj okuloj jenan bildon: milito furiozis, multaj homoj mortis. Ankaŭ la patro batalis, ĉar la "sankta patrio" ja estis endanĝerigita. Longtempe li forestis, ĝis subite li venis, viziti sian familion. Ho, kia ĝojo! La patrino pro emocio eĉ ne povis paroli. Kiel fieris Otto (tio estas la nomo de la knabo) vidante la patron kiu portis sabron, pafilon kaj sur la kapo kaskon. Kaj la patro ĉion klarigis al Otto, Jen, kiamaniere ŝargi la pafilon, tiel ekpafi, denove ŝargi kaj konstante ŝargi — ekpafi, ŝargi — ekpafi. Kiel brilis la okuloj de Otto! Kiom ĝojis la patro! Nur la patrino subite strange silentiĝis. Otto rigardis ŝin kaj — rimarkis ŝian palan vizaĝon, trans kiu malsuprenrulis grandaj larmoj — malrapide. Otto ektimis. Nun ankaŭ la patro atentiĝis kaj rigardis sian edzinon. Kun energia manmovo li formetis la pafilon, prenante la manojn de la patrino: "Ne ploru", li diris "ne ploru — ja devas esti tio, sed mi ne plu montros al Otto", kaj post mallonga paŭzo li aldonis: "Ja devas esti". — Profunde ĝemis la patrino: „Ne devas esti tio" —

Tiun bildon tutklare Otto vidis nun, rigardante la ludantajn knabojn, kaj li pensis: "devas esti", — eble la patro pravas. Sed "ne devas esti" diris la patrino. Tute klara mi ne estas, sed ludi kvazaŭ soldato, imiti soldatan vivon — mi ne volas.

Jen — instruo de malgranda knabo.

Po dudek en la vico . . .

Kunlaboranto de la Nov-Jorka gazeto "Tribüne" skribas:

Estu marŝantaj antaŭ niaj spiritaj okuloj la dummilite mortigitoj de Britio trans la Fifth Avenue¹). Ĉi pretermarŝo diras pli al ni ol ciferoj:

Ili ekmarŝus antaŭ tagiĝo po dudek en la vico. Ili marŝadus ĝis la sun-subiro . . . kaj la sekvantan kaj postsekvantan tagon. Dek tagojn pretermarŝadus la britaj mortigitoj. La dekunu sekvantajn tagojn sekvus la francaj. La rusoj bezonus kvin semajnojn. Du kaj duonon da monatoj daŭrus la pretermarŝo de la mortigitoj el la „aliancaj" ŝtatoj. La mortigitoj de la "centraj" regnoj bezonus pli ol ses semajnojn por pretermarŝi.

Tiel pretermarŝadus ti-kiuj mortfalis dum la milito en la daŭro de kvar monatoj po dudek en la vico trans la kvina aleo . . .

(El la Züricha jurnalo "Neniam plu milito").

Kortegano.

¹) Elp.: fifd évenju = kvina aleo, fi-famkonata ĉefstrato en Nov-Jorko, kiun enloĝas ĉefe la grandaj financulo de Usono. Trad.

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)